

**10a ORDINARA DIMANĈO - 5a de junio 2016**

## **KNABO, PAROLAS MI AL VI: LEVIĜU!**

**Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Luko 7, 11-17**

**En tiu tempo Jesuo iris al urbo nomata Nain; akompanis Lin liaj disĉiploj kun granda homamaso. Kaj kiam Li alproksimiĝis al la urba pordego, jen oni alportis mortinton, la unusolan filon de iu vidvino. Akompanis ŝin granda homamaso el la urbo. Kiam la Sinjoro vidis ŝin, Li kortuŝiĝis, kaj diris al ŝi: „Ne ploru!” Poste Li alproksimiĝis kaj tuŝis la ĉerkon. La portistoj haltis. Tiam Li diris: „Knabo, parolas Mi al vi: leviĝu!” Tiam la mortinto leviĝis kaj komencis paroli. Kaj Jesuo redonis lin al la patrino. Timo kaptis ĉiujn, kaj ĉiuj gloris Dion, dirante: „Granda profeto leviĝis inter ni!” Aliaj diris: „Dio vizitis sian popolon.” Kaj la famo pri Lia mesaĝo disiris tra la tuta Judeo kaj tra la tuta ĉirkaŭaĵo.**

La hodiaŭa epizodo aperas nur en la evangelio laŭ Luko. La aliaj silentas pri ĝi. Tamen la okazaĵo estas rimarkinda, sensacia. Ni sekvu la tekston: *“En tiu tempo Jesuo iris al urbo nomata Nain;...”* Nain estas urbeto 10 kilometrojn sude de Nazareto: urbeto malgranda, neniam citita en la Malnova Testamento. Probable la etimologio de la nomo estas popola vorto signifanta “gracia”. “io gracia” ... *akompanis Lin liaj disĉiploj kun granda homamaso*”. Do Luko prezentas Jesuon, Liajn disĉiplojn kaj homamason kiel procesion marŝantan al tiu urbeto. Kaj Luko prezentas kontraste alian procesion venantan de la urbo, procesion pro morto. Luko emfazas la kontraston: *“Kaj kiam Li alproksimiĝis al la urba pordego, (temis pri urbo kun remparoj) jen oni alportis mortinton, la unusolan filon de iu vidvino”*. Tio estis drama tragedio. Kiam mortis la unusola filo de vidvino, neniu viro povis

prizorgi ŝin, ŝin vivteni, en la plena signifo de la vorto. Do mortis la filo, sed la vivo de la patrino mem estis en danĝero. Verkante pri ĉi tiu epizodo, Luko certe memoris faman epizodon pri profeto Elija, kiu revivigis la mortintan filon de la vidvino en urbo Zarepta (1Reĝ 17, 12-24).

*"Kiam la Sinjoro vidis ŝin, Li kortuŝiĝis,..."*. Unuafoje aperas en la evangelio de Luko tiu verboparo *"vidi kaj kortuŝiĝi"*, sed kortuŝon la judoj atribuas nur al Dio. En ilia lingvo, la homoj kompatas sed nur Dio kortuŝiĝas, ĉar tio signifas transdoni viv-energion, redoni la vivon al kiu vivon ne havas.

Trifoje ni renkontas tiun esprimon en la evangelio de Luko. La unua, kiel ni diris, estas ĉi tiu. La dua estas en la parabolo pri la Samariano, kies koro tuŝiĝis, kiam li vidis la kompatindulon (Lk 10, 33): tiukaze Jesuo atribuas al tiu homo, taksata kiel la plej malproksima de Dio, la samajn sentojn kaj agojn de Dio. La tria estas en la parabolo pri la diboĉa filo, kiam la patro vidas la filon kaj lia koro tuŝiĝas (Lk 15, 21): al tiu filo, kiun oni opiniis mortinta, li redonas la vivon.'

*"... kaj diris al ŝi: „Ne ploru“*. "Poste Li alproksimiĝis, kaj la posta gesto nin surprizas *"... kaj tuŝis la ĉerkon."* Kial Li tion faris? Tio ne estis necesa. Ni legu plu: *"... La portistoj haltis. Tiam Li diris: 'Knabo, parolas Mi al vi: leviĝu!'"*. Jesuo povis diri precize la saman frazon ne tuŝinte la ĉerkon. La demando restas sen respondo, se ni ne legas la leĝon de Moseo. En la libro de la Nombroj (Nmb 19, 11-16) estas skribite, ke oni ne tuŝu kadavron, ĉar tiu ago malpurigas la tuŝinton.

Kiun signifon donas al tio Luko? En tiu tempo oni kredis, ke malobeo al la leĝo estas kaŭzo de morto. Sed laŭ Jesuo la malrespekto de la leĝo estas kaŭzo de la vivo. Do laŭ Luko Jesuo intence tuŝas la ĉerkon, kio ne estus necesa.

*Tiam Li diris: „Knabo, parolas Mi al vi: leviĝu!"*. Jesuo uzas la volitivan formon. *"Tiam la mortinto leviĝis kaj komencis paroli."* La ekparolo estas la pruvo, ke revenis la vivo. *"Kaj Jesuo redonis lin al la patrino"*. Luko nun turnas sian atenton al la rezulto de la ago de Jesuo ne por la ido, sed por la patrino. Ĉar ĝuste la patrino pro la morto de tiu ido estis perdinta ĉian viv-esperon.

La rolantoj de ĉi tiu epizodo estas sennomaj. Kiam en la evangelio iu rolanto esta sennoma, tio signifas, ke tiu rolanto reprezentas iun kategorion. Ĉi tiu epizodo ne estas simpla kroniko, sed atentigo pri multe pli profunda

vero. Kiu estas la patrino, senespera pro la morto de la sola filo? Ĝi estas la Izraela popolo. Tiu popolo estas ja senespera. Nu, Jesuo povas revivigi la esperon en tiu popolo.

Ni vidu, kiel la personoj reagas. *"Timo kaptis ĉiujn..."* (ili agnoskas, ke okazas ĉi tiu ago) *"... kaj ĉiuj gloris Dion, dirante: „Granda profeto leviĝis inter ni!”*. Kial tiu deklaro? Ĉar tiam oni opiniis, ke ne plu ekzistas profetoj, ĉar Dio estas tiel kolera kontraŭ sia popolo, ke ne plu estas la profetoj, kiuj anoncu Lian volon.

En iu psalmo oni kantas: *"Ne estas plu profetoj, kaj inter ni neniu scias, ĝis kiam."* (Ps 74, 9). Tiu estis la lamento de la popolo. Nun ili rimarkas, ke tra Jesuo la komuniko inter Dio kaj la homaro rekomenciĝis. Jen, kial ili rekonas Jesuon ne nur kiel profeton, sed kiel grandan profeton. Li ne nur anoncas la volon de Dio, sed komunikas la dian vivon mem.

*"Dio vizitis sian popolon kaj faris por ili elĉeteton"* skribis Luko en la komenco de sia evangelio (Lk 1,69) en la kantiko de Zeĥarja. Nun la popolo komprenas, ke la celo de tiu vizito de Dio al sia popolo pere de Jesuo estas la konduko al plena liberiĝo. Kaj konkludas Luko:

*Kaj la famo pri Lia mesaĝo disiris tra la tuta Judeo kaj tra la tuta ĉirkaŭaĵo".*

Kiu mesaĝo? Ke en Jesuo oni povas retrovi la viv-esperon, la certecon pri estonteco. Jesuo certigis sekuran vivon al tiu familio kaj al tiu vidvino. La vivo donita al la filo de tiu vidvino, kiun oni interpretu kiel la viv-esperon donacitan al la tuta popolo, disvastiĝis tra la tuta Izraelo.